

Mensuel
Numéro 67
Août-Septembre
2010

Zone euro : 3,50 €
Suisse : 5 FS
Autres pays : 4,50 €

La SAGO

La Sat-Amikara GazetO

*Espéranto :
vers une culture sociale sans frontières.*

 **SAT-Amikaro**
Espéranto, langue sans-frontières

 **Amikaro**
l'Espéranto pour tous...



La lagulinoj forviŝas la jetitan
fragjeleon de l' fi-Lino
kaj plu kviete lagas...
p. 2


**Konkursaj
emblemoj pliaj!**
p. 15

**Esperantistoj aktivas
dise ĉie...**

p. 18-20




**Libroj vivas pli ol
unu sezono**
p. 13



**Novaj eldonaĵoj
de
SAT-EFK**
p. 5



Buletojn kuiri
p. 2



La Sudfranca Kanalo

p. 6-7



**Ĉu via onta vojo
al kongreso en Seto ?**


Kaj la propraj nomoj ?

Oni laboras prie !

- p. 14-15 *recenze al [Cherpillod]-aĵo*
- p. 16-17 *plu Esp-igante, 11a parto !*

**La legendoj
plu legendas**
p. 7

Interalie
Traktaĵo pri ateologio
kun antaŭparolo
de la aŭtoro
p. 9



Flore kuiru !

Germanaj buletoj

500 g da hakita viando
1 cepo
1 ovo
2 tranĉaĵoj da molpano
2 kuleretoj da mustardo
salo, pipro

Tranĉu la cepon en pecetoj kaj miksu kun la hakita viando kaj aldonu la ovon. Bone akvumu la molpanon kaj aldonu ĝin al la miksaĵo kun la mustardo, salo kaj pipro.

Faru bulojn per tiu pasto kaj fritu ilin en olea pato, dum ĉirkaŭ 3 min ambaŭflanke.



Flora Markov



Mi ricevis tion:

Ĉi tie mi respondos al la demando, kiun neniu faris al mi, kion mi opinias pri la parodia epizodo de la anciaj aventuroj prezentita en la ĵus alveninta 66-a numero de «La Sago».

Mi estis preskaŭ sufokita pro indigno.

Mi esperas, ke por montri, ke tiu krude polpoteca karikaturo estis vera farso nepre ne unuagrade kompreninda, oni vidigos en venonta numero de «La Sago» nian simpatian ancian paron releviĝi kun ridego, viŝante de si la frambokonfitaĵon ŝprucigitan de la hilionia koboldo al ili.

Tiu bildo lerte desegnita tute ne spegulas la SAT-ecan komprenon pri klasbatalo.

«Francoj respektas nenion», foje diris al mi portugala kamarado. Vidante tian piratan parodion, pri tia franca speco de

nigra humuro mi konfesas, kiel oni diras en la franca, «Faut se le Far Sir» (ĝi estas malfacile digestebla; pardonu Serge).

Naŭzite,

Kara Petro

Trankviliĝu. L' ago de l' fi-Lino kontraŭ la filino de l' lago - kaj ties patrino - ja ne finiĝas sange sed jelee, kaj por la dua fojo, ili eskapas al ŝajna forpaso (memoru: jam ili kvazaŭ pereis en Atlantiko...)

Tamen tiu interludo (ĉar ja temas pri ludo) helpis min maski la hontindan tendencon reuzi malnovajn bildojn. Fakte la epizodo 66 komplete similas la nunan 67, krom en la fina teksto.

Ni danku Linon, kiu malmonotonigis la serion.

Petro.

Sergo



Bonan novjaron, je niaj (s)anoj !

Ja ne nur por la lernejoj rekomenciĝas septembre la studjaro, sed ankaŭ la esperanto-kursoj tradicie (re)ekas tiuperiode, post la feriaj forvojaĝoj al esperanto-aranĝoj k sekve de la septembraj budoj (dum la HomarFesto, dum urbaj «foiroj de la asocioj», ktp). Do ni deziru al ĉiuj esperanto-agadoj sukceson por la agad-jaro 2010-2011!

Sed bondeziri k esperi (eĉ se verdlingve) sukceson ne sufiĉas por venigi ĝin. Por atingi celon necesas (k preskaŭ sufiĉas) ĉefe taŭge organiziĝi k kohera adaptiĝi al la praktikaj cirkonstancoj. Jen la utileco de lokaj asocioj (kiel la regionaj grupoj) k de pli vast-areaj strukturoj (kiel UFE je nacia skalo por la ĝenerala publiko k kiel SAT-Amikaro specife por verbado en laboristaj medioj franclingvaj).

Do aniĝo ja havas sian utilon, ne nur por ĝui la asociajn servojn (SAT-Amikaro ne estas entrepreno kun klientoj aŭ akciuoj!), sed unue por pliefiki la aktivadon de unuopaj aŭ pluropaj individuoj. Tio por enkonduki serieton da alvokoj, kiuj montras ke riĉenhava asocia vivo ne eblas sen aktiva membraro, kiu regule partoprenas ĝin.

■ *Alvoko al deĵorado en la pariza sidejo*

De baldaŭ jardeko la asocio akiris sidejon en videbla pariza bulvardo (Vincent Auriol), kiu ebligas vidigi priesperantan montrofenestron pli ol 10 metrojn longan al miloj da ĉiutagaj preterpasantoj piedaj, biciklaj, aŭtaj, metroaj. La skipeto, kiu de la komenco zorgis pri ĉiusemajna deĵorado nun bezonas anstataŭantojn, k do ĉiuj proponoj de kamaradoj, kiuj pretas helpi en tiu grava tasko kundefori estas bonvenaj (ne nepre endas esti mem esperantisto, cetere, sed gravas ebligi nesolecon de la volontuloj dum la deĵorado). Aparte por la mardoj necesas helpo, ĉi jare.

■ *Alvoko al plibonigo de la asocia retejo (sat-amikaro.org)*

En nuna epoko, se la klasika buda/revua verbado restas nemalhavebla k esenca, la gravo de kvalita retejo estas ankaŭ nesubtaksenda. Tiurilate eblas ĝoje anonci, ke du jarojn post festo de la 1000a artikolo publikigita, ni jam preterpasis 1500. Regule aperantaj estas ĉefe informoj franclingvaj el la amaskomunikiloj k anoncoj pri okazontaj e-rilataj eventoj. Menciindas ankaŭ la freŝe starigita monata reta informletero (franclingva destinata al ekstera publiko), kiu ekis en junio k jam dissendatas al ĉ. 250 retadreso. Dum septembro-oktobro staĝos juna esperanta studento pri komputiko, kies ĉefa celo estos aranĝi la retejon por plitaŭgigi ĝin. Do ĉiuj interesatoj informu pri eventualaj sugestoj pri modifoj, k ne

forgesu ke la retejo estas kunlabora, t.e. ke ĉiu ano povas laŭpete havi propran aliron por memstare aldoni artikolojn k korekti ekz. tajperarojn.

■ *Alvoko al konstanta ĝisdatigo de la kurso-informoj*

Gravega rubriko de la retejo estas tiu kiu listigas lokajn kursojn laŭregione, k kiu plu meritas kompletigon k ĉefe akuratan ĝisdatigon kiam estas horarŝanĝoj k simile. Informoj pri kursoj kompreneble ankaŭ aperas regule k laŭpete rekte en La Sago, kvankam tie la uzebla spaco estas limigita. Do nepre informadu pri viaj lokaj kursoj k iniciatoj! Se kontakt-ebleco en via regiono ne aperas en ĉi Saga suplemento, nepre korektu tiun mankon informante nin.

■ *Alvoko al densigo de la reto de lokaj perantoj*

Jam estas homoj el pluraj regionoj, kiuj anoncis sian pretecon esti loka referenculo kontaktebla por interŝanĝa ricevo/ sendo de informoj el/al la komitato. Ne peza laboro fakte, sufiĉas lasi ĉu retadreson ĉu telefonnumeron k konsenti estis kontaktebla de lokaj scivolemaj esperantistiĝantoj. K dezirinde estas havi kiel eble plej malgrandajn maŝojn por tiu perantoreto: ju pli multaj la perantoj, des pli eta la areo priperenda!

■ *Alvoko al disvastigo de la Esperanto-filmo*

Pasintnumere vi ricevis suplemente koloran informilon-mendilon pri la dokument-filmo pri Esperanto nun verkata de Dominiko Gaŭtiero. Temas pri grava ambicia projekto kies sukceso dependas de nia kapablo diskonigi ĝin. Unua paŝo estas ke ĉiu loka klubo antaŭmendu ekzempleron por sia grupo k planu malferman projekciadon por tuŝi vastan publikon. Pluraj asocioj k lokaj grupoj jam mendis sian ekzempleron, do ankaŭ vi nun mendu, se ne jam farite! Memorigindas, ke la filmo estos antaŭ-premiere projekciita dum la Interasocia E-Renkontiĝo ĉe Mediteraneo en Seto, kiun vi povas tuj aliĝi per la ĉi Sage kunsendita aliĝilo. Ne maltrafu la unuan limdaton por kongreskotizi (1a de oktobro)!

■ *Alvoko al la tuta legantaro*

Fine jen tute specifa afero: se iu havas kontaktojn kun Francis Briuelle, Janine Sleysser, Louis Martin, Sandrine Fossat, tiu kontaktu nin, ĉar ili pagis kotizon sed ni ne povas sendi al ili la revuon pro manko de adreso (k telefonnumero, retadreso ktp...)!!

Por la komitato, la sekretario
Markovo Vito

Enhavo

- 1 Kovrilpaĝo pri l' enhavo...
- 2 Flore kuiru
Ĉe la lago 66+67
- 3 Ĉefartikolo: Alvokoj de la komitata sekretario.
- 4 Kontrolata socio (lasta parto)
- 5 El la SAT-movado
- 6-7 Kontribuo al Vikipedio:
La Sudfranca Kanalo
- 7 Legindaj Legendoj
- 8 El nia leterkesto
Selle-humuraĵoj

Supplément en français

- 9-10 Michel Onfray
- 10 Congrès de SAT
- 11-12 Dans la presse ou ailleurs...
- 13 Libroj vivas pli longe ol unu sezono
- 14-15 Libro-Servo
- 15 Emblemo-konkurso
- 16 Praktikaj informoj
- 16-17 Kiel esp-igi proprajn nomojn 11
- 18-20 Esperantistoj aktivas

Ĉi-numeraj
suplementoj:
* Aliĝilo por la
Seta kongreso
* Eo-kursoj

Partoprenis en ĉi numero:

(laŭ alfabeto ordo)

Andreo	Andrio
Jean-François	Blin
Meva	Cuenot
	Geneviève
Pierre	Grollemund
Phil'	Guichet
	Klod
JoLo	Ko
Daniel	Lachassagne
Ĵak	Le Puil
Teo	Levi
	Line
Flora	Markov
Lino	Markovo
Vito	Markovo
Michel	Onfray
	Petro
Alain	Runel
Jean	Selle
Serĝo	Sir'
Juliette	Ternant
	la Verdaj Tigroj
Cercle Bitérois	d'Espéranto

Kontrolata socio (tria k lasta parto)

Per la komunecaj TTT-ejoj (franclingve *sites communautaires*), ekzemple *Facebook*, la anoj kutime diras pri siaj geamikoj, renkontiĝoj, animstatoj, komunikas siajn fotografaĵojn kaj lokojn de vizitado. La liverantoj de aliroj al Interreto (franclingve *fournisseurs d'accès*) leĝe devas konservi dum unu jaro spuron de la aktivecoj de siaj klientoj, por ebligi al la aŭtoritatoj, laŭ juĝa postulo, priserĉadon en ilia informadika pasinteco. La listo de la konservotaj spuroj, tiel nomataj «konektaj donitaĵoj», koncernas preskaŭ ĉion, kio estas farebla per Interreto, escepte de la enhavo de la elektronikaj korespondataĵoj, ĉar tio laŭleĝe respondus al personecigita subaŭskultado. La komunecaj TTT-ejoj estas fonto de personaj informoj sub la dispono de la reklamado. La operatoroj de komunecaj TTT-ejoj vendas al reklampagantoj tipajn prezentojn de interretanoj (adreson, aĝon, familian situacion, inklinojn, distrojn, profesiajn projektojn), kiuj ebligas konigi hejme komercaĵojn. 250 milionoj da interretanoj havas konton ĉe la komuneca TTT-ejo *Facebook*, 110 milionoj ĉe *Myspace*.

Eniĝo en informadikajn sistemojn (anglalingve *hacking*) estas farebla de izolitaj aŭ grupiĝintaj interretanoj oportune utiligantaj la finaĵojn aŭ sufiksojn, kiuj indikas la econ de la celataj datenbankoj, kaj parigantaj la esploron kun ŝlosilvortoj respondaj al la celata sistemo. Tiuj informadikaj piratoj (anglalingve *hackers*) sukcesas multekoste vendi sian talenton al entreprenoj aŭ institucioj, kies datenbankoj estas atakitaj. En pluraj universitatoj, ekzemple en Dundee (Skotlando), oni faras kursojn kaj eĉ donas diplomon pri «etika piratado» (anglalingve *ethical hacking*). Tre agemaj informadikaj piratoj plenumas taskojn, kiuj malkaŝe rilatas al industria, polica aŭ milita spionado. Multaj kunvenoj pri la informadika sekureco okazas en lokaloj, kiu apartenas al la armeo.

Super Parizo konstante patrolas 2 helikopteroj ekipitaj per kamerao tiom potenca, ke ĝi povas registri bildojn de fuĝanto, sen vekti la atenton de ĉi-tiu lasta. Tio ebligas gvatsekvadojn tre diskretajn, ĉar la helikopteroj ne povas esti lokalizataj pro ilia alteco sur la ĉielo. De alia flanko, servoj de la polico kaj ĝendarmaro ekzamenas la eblon uzi telekondukatajn senpilotajn flugmaŝinojn ordinarie nomatajn *drones* (anglalingva vorto signifanta «virabelo»), ekipitajn per kamerao, sed la elmeto de pratipoj al provoj aperigis riskon de kraŝoj.

En Grenoblo (lzerio) troviĝas unu el la 4 plej grandaj centroj en la mondo pri la nanoteknologioj (franclingve *nanotechnologies*), iniciatita de la komisariato pri la Nuklea Energio (franclingve *Commissariat à l'énergie atomique-CEA*) kaj inaŭgurita la 1-an de junio 2006 sub la nomo *Minatec*. Konsiderante, ke nanometro respondas al miliono de milimetro, la nanoteknologioj malfermas vojon al plej diversaj aplikoj inkluzive de

la videokontrolado kaj spionado. Hodiaŭ, jam troviĝas nanopartikloj en kosmetikajoj, sunkremo, pneŭmatikoj, ĉokoladaj stangetoj, supopulvoro en saketoj, por malebligi formiĝon de grumeloj... Entuziasmigataj scienculoj, teknokratoj kaj politikistoj senĉese laŭdas la magiajn efikojn de la nanoteknologioj: oni inĝenie aranĝos la infinitezimon ĝis la plej elementaj niveloj de la molekuloj, ĉeloj, genoj kaj neŭronoj; per modifado de la materia strukturo kaj per konstruado de novaj materialoj, atomo post atomo, oni povos profunde ŝanĝi la elektronikon, medicinon, agrikulturon kaj industrion. Kalifornia entrepreno enmetis elektronikajn blatojn en la korpon de 2.000 volontuloj, kiuj tiel povas eniri en sekurigatajn lokojn.

La nanoteknologioj naskis fanatikajn subtenantojn. Ekzemple, la filozofo *Jean-Pierre Dupuy*, profesoro en Politekniko (Francio) kaj en la universitato de Stanfordo (Usono), opinias, ke malpermeso de disvolviĝo de la nanoteknologioj «ne estas pli saĝa, ol demando pri neceso malpermesi la antaŭeniron de ciklono aŭ cunamo», kaj li faris la jenan proponon: «Oni konstante pripensu tion, kaj se oni devas krevi, oni tutsimple ne krevu de idioteco».

La homa spurado (franclingve *traçage humain*) povus banaliĝi. En sia libro titolita *Le meilleur des nanomondes* (La plej bona el la nanomondo), la aŭtorino *Dorothee Benoit-Browaey*s rimarkigis, ke «la grava maltrankvileco rezultas ne tiom el nura disvastigado de la identigaj elektronikaj blatoj, kiom prefere el kontaktigo inter la identigaj datenbankoj, kiuj lokalizas kaj informas pri plej diversaj aferoj (kondutoj, kutimoj, malsanoj...)

De sia flanko, la prezidanto de la KNIL-o skribis la jenon en la gazeto *Les Echos* aperinta la 7-an de aprilo 2009: «Post dekelke dajaroj, pere de la nanoteknologioj oni disponas informiĝajn sistemojn tiom malgrandajn, ke ili ne plu estos videblaj eĉ per ordinaraj mikroskopoj. La risko kuŝas en tio, ke ni neniam havos plu la garantion de soleco. Ja ne plu estos intimeco. Nu, laŭ mia opinio, kiam en socio garantio de soleco ne plu ekzistas, tiam tia socio estas diktatoreca».

Fabrikantoj havas bonan motivon ĝoji, ĉar la administracio ordonis ekipi per elektronikaj blatoj *Rfid* (anglalingva mallongigo: *Radio Frequency Identification*) ĉiujn hejmbestojn (hundojn, katojn), distrobestojn (azenojn) kaj bredobestojn (ĉevalojn, ŝafojn). Koncerne la azenojn kaj ĉevalojn, tio estis deviga ekde la 1-a de januaro 2008 kun risko de monpuno por la malobeemaj posedantoj. Koncerne la ŝafojn, la devigo plenumiĝas dum la jaro 2010, kaj la hejmbestoj estos submetitaj al ĝi en la jaro 2011.

Direktivo alprenita de la Komisiono de la Eŭropa Unio (en Bruselo) en la jaro 2003 specifas, ke la elektronikaj blatoj estos rigardataj kiel rimedo, por oficiale identigi

la «domajn karnovorantojn» sur la tuta teritorio. Fakulo de la Societo por Bestkuraca Elektronika Identigo (franclingve *Société d'identification électronique vétérinaire - Siev*) klarigis jene: «Temas pri libera cirkulado de la bestoj sur la teritorio difinita en Ŝengeno (*). Tio similas al la biometriaj pasportoj por la homoj».

Laŭ La Komisiono de la Eŭropa Unio, la spuradobleco (franclingve *traçabilité*) supozigas, ke ĝi garantias la nutran sekurecon, sed la kontraŭuloj rebatas, ke ĝi ebligas scii pri la deveno de viando, sed ĝi tute ne certigas kvaliton.

Koncerne la hundojn, katojn kaj ĉevalojn, la elektronikaj blatoj ne estas pli grandaj ol grajnoj de rizo kaj enplantiĝas sub la felon. Koncerne la bredobestojn, ili plej ofte troviĝas ĉe la kutimaj oreletikedoj.

La elektronikaj blatoj *Rfid* ekfunkcias nur proksime de magneta kampo. Ili transdonas numeron, kiu ebligas identigi posedanton. Doktoro pri biofiziko kaj bestkuraca ekspertizisto ĉe la pariza apelacia kortumo senĉese denuncas la trompon pri la elektronikaj blatoj *Rfid*. Laŭ lia diro, por definitive ĉesigi la funkciadon de tia elektronika blato, sufiĉas, ke oni estigu subitan varion de magneta kampo. Tion faras ŝakristoj koncerne hundojn.

Konsidere la staton de la scienco kaj tekniko sur la kampo de la socia kontrolado fare de la ŝtataj institucioj, oni inklinas imiti la surrealistan verkiston *André Breton* (1896 - 1966), kiu siatempe kriis jene al la atomscienculoj: «Vakigu la laboratoriojn!»

Jean Selle

Resenda signo.

* La 14-an de junio 1985, en la luksemburgia urbeto Ŝengeno (*Schengen*) subskribiĝis interŝtataj interkonsentoj, kiuj koncernis Belgion, Francion, Germanion, Luksemburgion, Nederlandon, kaj havis la celon forigi la kontrolojn ĉe la limoj komunaj al tiuj landoj. La 19-an de januaro 1990, konvencio kompletigis tiujn interkonsentojn kaj ebligis la aliĝon de aliaj regnoj: Italio en la jaro 1990, Grekio, Hispanio kaj Portugalio en 1991, Aŭstrio en 1995, Danio, Finnlando, Islando, Norvegio kaj Svedio en 1996... (El la enciklopedio *Quid 2007*)

Noto.

La elementoj de tiu artikolo fontas el la enhavo de broŝuro titolita «*Je te vois!*» *Comment nous sommes tous sous surveillance*, aperinta en junio 2009 kaj apartenanta al la kolekto nomata *Les dossiers du Canard* (173, rue Saint-Honoré, 75001 Paris).

El la SAT movado... Gvidrezolucio 2010

La 83-a Kongreso de SAT kunveninta en Braŝovo inter la 1-a kaj la 6-a de aŭgusto 2010,

- aprobas kreon de specife porkongresa solidarkaso, kies celo estu anonime ebligi aktivajn membrojn finance povi partopreni la SAT-kongreson,

- plu konstatas la daŭre bonkvalitan laboron de la Eldona Fako Kooperativa notinde rilate al nun profesie pretigata dokumentfilmo pri Esperanto kaj plu instigas SAT-anojn mem partopreni en vivigo de la kooperativo k, tute aparte, aktive kontribui al starigo de efika disvendoreto ankaŭ je loka kekestera SATa nivelo. Ĉiu SAT-rondo klopodu organizi ekzemple unu publikan projekciadon de la filmo, kaj laŭeble helpu la projekton per antaŭmendoj.

- instigas ĉiujn SAT-anojn kontribui al pliriĉigo de Vikipedio, aparte pri SAT-ecaj temoj,

- esprimas sian kontenton pro efika antaŭenigo de la pretigo de elektronika PIV per subskribo de kontrakto kun la vigla E@I-skipo kaj kuraĝigas ĝin en ĝia strebado por konkretigo de tiu grava projekto jam antaŭ la venonta kongreso,

- alvokas al utiligo k larĝa disvastigo de la pretigita faldfolio pri SAT k instigas jam pretigi la sekvan plibonigitan eldonon,

- invitas ĉiujn kamaradojn informi la membraron pri la situacio en siaj respektivaj mondregionoj per kontribuoj al Sennaciulo k Sennacieca Revuo, emfazi la tutmondan rolon de SAT per kontaktiĝoj inter esperantistoj de diversaj mondpartoj por riĉigi sian klerigan laboron, k ne neglekti la informadon pri la asocia vivo (notinde de fakoj, frakcioj, LEA-oj), instigas krome SAT-anojn varbi novajn abonantojn por ambaŭ gazetoj, kaj traduki artikolojn por publikigo en nacilingvaj gazetoj,

- plu instigas la kamaradojn kontribui al la SAT-retejo per sendado de materialo al ĝia respondeculo ĉu per rekta enretigo de originala materialo ĉu per traduko de la artikoloj troviĝantaj en la nacilingva parto (aparte koncerne tekstojn Kio estas SAT -nun 13 lingvoj- kaj Esperanto ? Kio estas tio ? -nun 5 lingvoj-) almenaŭ en lingvoj korea, pola, rumana, serba,

- alvokas kompetentajn k-dojn helpi al modernigo de la reteja hejmpaĝo k ebligado funkciigi SAT-forumon rekte en ĝi,

- proponas sistemigi per tradukreto la proponadon kaj tradukadon de nacilingvaj SAT-ecaj klerigaj tekstoj, notinde tiel helpante vivigon de la Eo-sekcio de retejo Labourstart, tiel ke en ĝi aperu ĉiumonate minimume unu artikolo el ĉiu kontinento ; resumo pri tiuj sindikataj novaĵoj aperu en Sennaciulo,

- petas de ĉiuj SAT-anoj intervenon por kontroli ĉu ilia registaro subskribis k ratifis la konvencion de Oslo (2008), kiu malpermesas iujn pafaĵojetojn el bomboj, k la konvencion de Otavo (1997) , kiu malpermesas la kontraŭpersonajn minojn,

- proponas, ke SAT k ĝiaj membroj prenu pli da atento pri monda paco, strebu helpi kun ĉiuj pacistoj « kontraŭbatali » ĉiujn iniciatojn kiuj endanĝerigas pacon en iu ajn loko en la mondo,

- plu vokas SAT-rondojn, SAT-frakciojn, LEA-ojn kaj SAT-anojn sendi precizajn informojn pri kursoj, varbado direktita al ekster-SAT-a medio kaj apero de artikoloj pri Esperanto aŭ SAT-rilataj temoj,

- petas la Plenum-Komitaton malfermi konton en plej etika banko NEF (k poste BEE) por deponi parton de la disponebla mono de la asocio. La eventualaj interezoj estu utiligitaj por provizi la solidarkasojn de SAT,

- invitas la Plenum-Komitaton flegi rilatojn kun IFEF (Internacia Fervoja Esperantista Federacio), minimume per sendo de salutmesaĝo al ilia kongreso, kaj se eble per starigo de laborgrupo por starigo de tutmonda publika fervojmastruma sistemo,

- petas la Plenum-Komitaton zorgi, ke en la venonta kongreso estu antaŭvidita ebleco organizi pliajn klerigsesiojn pri konkretaj temoj,

- decidas ke kleriga artikolo pri SAT-kontado aperu aŭ/k en la retejo aŭ/k en Sennaciulo k petas de la Plenum-Komitato prezenti kontadon por ke ĉiuj membroj pli facile komprenu ĝin,

- invitas ĉiujn SAT-anojn jam aliĝi la 84-an SAT-kongreson okazontan en Sarajevo inter 30a de julio k 6a de aŭgusto 2011, laŭeble kontribui al ĝiaj preparado k programo, k informadi pri ĝi al la tuta esperantistaro,

- petas la Plenum-Komitaton koncizigi k finfari la kongresregularon k prizorgi mem la planadon de fakaj k frakciaj kunvenoj dum la kongreso.

Plena Ilustrita Vortaro en la reto!

E@I nun lanĉas donac-kampanjon por kolekti bezonatan sumon 10.000 € Se vi opinias la retan PIV subteninda iniciato, ni petas vin helpi ĝin konstrui. Kaze de sukcesa kampanjo la retejo aperos jam ĉi-jare. Pri la aktuala stato de donacoj ni ĝisdate informados en la retejo kaj sendante retmesaĝojn al donacintoj.



Donaci monon eblas per pluraj manieroj:

• PayPal-konto de E@I - al retpoŝtadreso financoj@ikso.net

• UEA-konto de E@I: ecxi-v

• Banko-konto de E@I en Slovakio:
Nomo de konto: EAI
IBAN: SK755200000000008887398
BIC/SWIFT kodo: OTPVSKBX
Adreso de banko:
OTP Banka Slovensko, a.s.
Nám SNP 212/4
SK-958 01 Partizánske, Slovakio

Rim.: Ĉe sendado de mono en la kampo «Mesaĝo por ricevonto» bonvolu skribi «PIV». Post sendado de mono per ajna maniero atentigu la teamon pri tio retpoŝte kaj eventuale indiku, ĉu vi volas aperi poste en la listo de donacintoj.

SAT-Eldona Fako Kooperativa eldonis ĉi jare:

vidu
kovrilpaĝe



Traktaĵo pri ateologio
de Michel Onfray
elfrancigis Paul Signoret
185 paĝoj; 24x16; 18€

Kanto Ĝenerala
de Pablo Neruda
(muziko : Mikis Theodorakis)
Libreto el 9 poemoj en esperanto-traduko el la hispana
Traduko : Georges Lagrange, Michel Duc Goninaz, Bernard Behra
22 paĝoj; 15x20; 4€



Tuikero la harkio kaj la cetero Vivatesto originale verkita en esperanto de Roĝero Kondono (Roger Condon)
150 paĝoj; 24x16; 15€

Transvikipedie: *de Fr: al Eo:* La Sudfranca Kanalo

La «**sudfranca Kanalo**» (*Canal du Midi*) aŭ la «**Kanalo de ambaŭ Maroj**» estas franca kanalo, kiu kunligas Garonon kun Mediteraneo. Pere de ĝi kaj de la flankkanalo ĉe Garono oni povis navigi de Atlantiko ĝis Mediteraneo. Ĝi estas plilongigita per la kanalo de Rodano ĝis Seto.

Ĉar ĝi unue estis nomita Reĝa Kanalo en Langvedoko, la revolucioj ŝanĝis ĝian nomon al «Sudfranca Kanalo», en 1789. Ĝiaj samtempuloj rigardis ĝin kiel la plej grandan konstruaĵon de post la dektria jarcento.

Striktasence la «Sudfranca Kanalo» indikas la komence efektivigitan parton, de Tuluzo ĝis Bordojo, de la projekto pri Kanalo de ambaŭ Maroj, ensemblo de navigeblaj vojoj, kiuj ebligis kunigi Mediteraneon kun Atlantiko:

- La «Sudfranca kanalo» kaj Garono pli malpli navigebla inter Tuluzo kaj Bordojo,
- Poste la flankkanalo ĉe Garono, sekve konstruita
- Kaj la estuaro de Ĝirondo apud Bordojo.

La tritika komerco kaŭzis ĝian konstruon. Ellaborita de 1666 ĝis 1681 dum reĝado de Ludoviko la 14a kaj ankaŭ antaŭ supera kontrolo de Petropaŭlo Riketo (*Pierre-Paul Riquet*) la Sudfranca Kanalo estas unu el la plej malnovaj eŭropaj kanaloj daŭre funkciantaj (la kanalo de *Briare* (1644) estas ĝia prototipo). La ekkonstruado de tiu laboraĵo estas strikte ligita al problemo de riverveturado en modernaj tempoj. La defio akceptita de Riketo estis aldirekti akvon de la Nigra Montaro (*la Montagne noire*) ĝis la Sojlo de Naŭruzo (*Seuil de Naurouze*), la plej alta punkto de la vojiro.

Ekde 1996 Unesko (*organizo de unuiĝintaj nacioj por edukado sciencoj, kaj kulturo*) klasis ĝin en la listo de homara hereda posedaĵo.

Lokalizado kaj profilo de la Kanalo

La suda kanalo trapasas tri departementojn: Heraŭtio (*Hérault*), Aŭdio (*Aude*) kaj Alt-garonio (*Haute Garonne*). Ĝi fluas 241 km inter Marselĵano (*Marseillan*) apud Seto, kie ĝi eniras en la Taŭno-basenon (*Thau*), kaj Tuluzo. Ĝi estas profunda ĉirkaŭ 2 m kaj larĝa ĉirkaŭ 20 m. Tiu kanalo posedas iun interkluzojn dividantan akvon, ĉar unu deklivo direkte iras al Atlantiko kaj alia direkte al Mediteraneo.

Historio


Forlasitaj projektoj

La fosado de tiu Kanalo estas malnova revo: Aŭgusto, Nerono, Karolo la Granda, Francisko la Unua, Karolo la Naŭa, kaj Henriko la Kvara jam revis pri tio. La plej realismaj projektoj estas proponitaj al reĝo en la 16a jarcento. Tiuj ĉi ne estis lanĉitaj pro timo de nemondonaj elspezoj kaj pro konvinko pri homa malebleco fosi tian kanalon.

La projekto de Riketo

En 1660 Riketo trovas solvon de la ĉefa problemo: alkonduki akvon al divida punkto por provizi la du deklivojn de la kanalo. Tiu celeli projektas kapti montarajn akvojn en kolektbarojn kaj aldirekti ilin ĝis Sojlo de Naŭruzo per kanaletoj. Kiam la reĝo Ludoviko la Dekkvara ekscias lian proponon en 1662 li ekvidas oportunon por senigi Hispanion je parto de ĝiaj monrimedoj kaj por stampi sian reĝadon per nepereonta arkitektura verko.

Riketo ricevis neniun teknikan edukadon. Li praktikas eksperimentadon kaj observadon de la tereno tamen lia labormaniero estas scienca. Li konstruas en sia bieno «*Bonrepos*» maketon de la kanalo kun kluzoj, tuneloj, elverŝoj respektante la deklivojn kaj provizante per akvo la ensemblon.



Politika kaj ekonomika kunteksto

Kolberto (*Colbert*) antaŭvidas, ke tiu projekto favoros ekonomikan ekspansion. La kanala konstruaĵo ebligis krei rektan pasejon, kiu evitas la markolon de Ĝibraltaro kontrolita de hispanoj, celante ruinigon de la hispana komerco kaj starigante komercan fluegon tra Langvedoko.

La loragezaj (*du Lauragais*) produktistoj penis eksporti siajn produktojn pro manko de komercaj rimedoj; tritikon, silkon, vinon, drapojn, kaj salon. Dank' al kanalo ili pli facile disvendos en diversajn regionojn.

Financado de la projekto

En Oktobro 1666 Kolberto (*Colbert*) permesas laborkomencon pere de reĝa edikto. Li ricevas helpon de Klervilo (*Clerville*) inĝeniero pri fortikaĵoj.

La ŝtataj financoj ne estas bonstataj do Riketo proponas parte financi laborojn per siaj propraj monrimedoj kontraŭ rajto de kanalo-proprietulo kaj -eksploatado.

Komence la buĝeto estis je 6 milionoj da tiamaj pundoj tamen finfine la tuto de la laboroj kostas 17-18 milionoj: 40% de tiu monsumo antaŭpagita de la reĝo, 40% de la provinco kaj 20% de Riketo mem.

Realigado de la kanalo

La unua parto de la laboroj komenciĝas la 1an de Januaro 1667: konstruado de la ebenaĵa kanaletoj.

-15 Aprilo 1667 metado de la unua ŝtono de la lago San-Fereolo (*Saint Ferreol*)

-Novembro 1667 metado de la unua ŝtono de la Garona kluzo en Tuluzo, do de la kanalo;

-Dum vintro 1671-1672 unua ŝip-cirkulado inter Sojlo de Naŭruzo kaj Tuluzo;

-1673 fino de la unua parto Tuluzo-Trebo (*Trèbes*);

Ekde 1671 komenciĝas la dua entrepreno por interkomunikigi Trebon kun Mediteraneo kaj por konstrui la havenon de la urbeto Seto (*Cette* en tiu epoko).

- Konstruado de triporda ronda kluzo en Agdo, kiu ebligas eniri en riveron Heraŭto (*Hérault*) kaj en la Taŭno-basenon..

- Konstruado de 8 sinsekvaj kluzoj en Fonserano (*Fonsérannes*) ĝis la rivero Orbo.

En 1680 Riketo forpasas kaj la reĝa inĝeniero Lafojlo (*La Feuille*) daŭrigas la aferon.

En 1681 fino de la kanal-laboroj en Beziero.

Oficiale la sudfranca kanalo estas malfermita al navigado la 15an de Majo 1682 kaj al trafiko en Majo 1683.

Konkurenco de fervojo

Strange, la kanalo ne vere plenumas sian taskon. La ekonomikaj kaj politikaj cirkonstancoj, la streĉiteco de la hispana milito (1936-1939) malebligas la esperitan ekonomikan kreskon. Post ducentjara eksploatado, la kanalo komencas suferi pro konkurenco fare de fervoja kaj ŝosea veturado. Ĝi atingas sian apogeon meze de la 19a jarcento.

En 1858, Napoleono la Tria elirigas dekreton, kiu koncesias la kanalon por kvardek jaroj al la kompanio de la Sudfranca fervojo posedanta la linion Bordojo-Narbono. Tiu dekreto pli grave malaltigas la cirkuladon de barĝoj sur la kanalo. Fakte, la kompanio favoras la fervojon pli taksante la kanalan komercan veturadon. La Sudfranca kanalo fariĝas la plej multekosta rivera vojo en Francio. Krome, fervojo ekestas pli regula

Legindaj Legendoj Tri Virgulinoj.

«Leginda Legendo» invitas vin legi legendojn el ĉiuj kontinentoj akompanatajn de lingvaj klarigoj.
Kvankam ĉefe destinita al komencantoj, «Leginda Legendo» povas interesi ĉiujn legantojn!

kaj rapida ol la rivera, des pli, ke la Sudfrancan kanalon malavantiĝigas limigita tonelaro.

La Sudfranca kanalo antaŭ la Tuluza stacidomo Matabio (*Matabiau*) (inaŭgurita en 1866) tiam estis tre ekspansiiganta.

Antaŭ 1859 la kanalo funkcias sola, sed poste en la suda parto de Francio ekestas fervojoj, kies konkurencon klare pravas la duoniĝo de varveturado inter 1859 kaj 1879. Poste, tiu veturado senĉese pli kaj pli etiĝas. Male, la fervoja linio Bordoza-Seto jam atingas 200 milionojn da tunoj-kilometroj ekde 1860.

En 1898, la kanalon ekadministras la Ŝtato, kiu per sinsekvaj investaĵoj klopodas daŭrigi ĝian konkurenckapablon. La Ŝtato forigas taksojn kaj vojimpostojn, tiel relanĉante kanalveturadon, kiu atingos 80 milionojn da tunoj-kilometroj en 1909.

Laboristaj kaj socialaj kondiĉoj

Dum 15 jaroj proksimume 12000 laboristoj estas dungitaj por la kanala realigado: viroj kaj virinoj inter 20-30 jaraĝaj, kiuj formas grupojn estratajn de iu ĝenerala kontrolisto.

La tuta laboro estas efektivigita mane. Por fosi la kanalon la laboristoj uzas ŝovelilojn, pioĉojn, plugpioĉojn. Ili mem devas prizorgi sian ilaron; korbetoj kaj brankardoj servas por transportado de la materialo.

La laboristaro konsistas el kamparaj kaj fabrikaj laboristoj; kelkfoje Riketo dungas soldatojn.

La financaj kaj socialaj kondiĉoj de tiuj laboristoj estas tre favoraj kaj nekutimaj rilate al tiu epoko: Salajrmonatigo por fideligi ilin, atribuado de malmultekostaj loĝejoj, dimanĉoj kaj festtagoj laborpagitaj, ripoztagoj pro malsano.

Komence la salajro estis duoble de terkulturista salajro sed ĝi malaltiĝas post malkontenteco de agrikulturaj proprietuloj.

Pliaj laboraĵoj

En 1686 Vaŭbano (*Vauban*) post kontrolo de la Kanalo taksas ĝin kadukstate. Li ordonas al Niketo aldoni novajn vorkojn:

- truadon de tunelo (Cammazes) por plilongigi la kanaleton de la Montaro
- plifortigon de la baraĵo de San-Fereolo por kontraŭstari sabloplenigon kaj ŝveligon de la kanalakvoj, faritajn de flualtiĝo de riveretoj, kiuj alfluas en la Kanalon.
- labormasonaĵojn por apartigi la diversajn riveretojn kaj pliajn elverŝejojn
- konstruadon de akvedukoj kaj ponto-kanaloj.

Tiu vorkoserio daŭras ĝis 1694. Tamen la Sudfranca Kanalo ankoraŭ havas mankojn: Ĝi ne trafas Karkasunon nek Narbonon, nek Rodanon kaj por atingi Bordozone oni estis devigata barĝi sur Garono kies variaj kaj fortegaj fluokvantoj ne estas tre favoraj.

- en 1776, Narbono estas kunigita pere de la Narbona Kanalo,
- en 1808 finiĝas la kunligo inter la Taŭno-baseno kaj Rodano
- en 1810 devojigo de la kanalo ebligas trafi Karkasunon
- en 1856 Bordoza trafeblas pere de la flankkanalo ĉe Garono.

Ĉiuj tiuj vorkoj konsistigas la finfaron de la kunligo inter Atlantiko kaj Mediteraneo, pri kio revis Riketo.

La Verdaj Tigroj el Kastelno (*Castelnau*)

Fonto: Canal du Midi. Wikipédia, l'encyclopédie libre. http://fr.wikipedia.org/w/index.php?title=Canal_du_Midi&oldid=55301308.

Rande de la montaro *Verkoro*, la bela vilaĝo *San-Nizjeo* kuŝas sur sufiĉe vasta montplataĵo¹. Impona roko, kvazaŭ giganta kaj eleganta monumento, impresas la vojaĝantojn per siaj altaj kunpremitaj turoj. Oni nomas ilin *Tri-Virgulinoj*.

Komence de la oka jarcento, vivis la senjoro² de San-Nizjeo en sia feŭda kastelo, kiu de alte rigardis al la urbo Grenoblo kaj al la altaj Alpoj. La regiono pace vivis.

Tamen, soldato-trupoj de Maŭroj el Hispanio invadis Francion. Forta kaj bone armita trupo alvenis en Daŭfenio, ne aŭdacis ataki la grandan ĉefurbon malantaŭ ĝiaj muregoj, sed atakis la San-Nizjean kastelon, milite valoran superantan lokon. La vilaĝanoj rifuĝis en la kastelo, ŝirme³ de la dikaj muroj, sed kompreneble, ili ne ricevis nutraĵon de ekstere. Post unu semajno, ne atendante malvenkon pro malsato, la francaj kavaliroj mallevis la levponton kaj surĉevalo, ŝpruce⁴ sturmis⁵ la maŭran trupon. La surprizo efikis, la sieĝintoj forfuĝis. Ve! Profitante de la batala konfuzo, ili rabis⁶ la tri filinojn de la senjoro. Tiu ĉi ploris sed ne povis postkuri la rabintojn ĉar, lia armeeto estis tro malgranda. La morgaŭon, alvenis je la kastelo la fama kavaliro Rolando, kiu militadis kontraŭ la Maŭroj por la imperiestro Karolo la Granda. Do, kun sia taĉmento, li postkuris la rabintojn, trafis kaj venkis ilin apud Liono. La tri junulinoj estis sanaj kaj savitaj. Rolando disponigis ĉevalon al la du plejaĝaj fraŭlinoj, kaj sidigis la plej junan sur sian propran ĉevalon, kaj revenis al San-Nizjeo por redoni al la patro liajn karajn infanojn.

Dumrajde⁷, laŭ la longa vojo, la tri fratinoj admiris la kuraĝan kavaliron, lian fortecon kaj belecon. Ili sentis en siaj koroj novan nekonatan senton. Eĉ pli ol siaj fratinoj, la plej juna, apenaŭ dekkvinjara, sidante inter la brakoj de la heroo kavaliro, tutkore enamiĝis.

Kiam Rolando alvenis en la kastelo, la senjoro, plorante pro ĝojo, varme dankis, kaj proponis al li la plej aĝan filinon, kiel edzinon. Rolando rifuzis ĉar, soldato, li ne povis ligi sian koron al iu virino, eĉ plej bela kaj ĉarma kaj lia nura kavalira devo estis obei kaj servi la imperiestron. Aŭdinte tion, la tri junaj fraŭlinoj silente ekploris. Post kiam Rolando foriris, sciante, ke neniam plu ili kapablos ami iun ajn, ili iris al la proksima monto, kaj tie, antaŭ la pejzaĝa beleco, sin premante unu kontraŭ la aliaj, ili por ĉiam ŝtoniĝis. Pro tio, oni sentas ian emocion, kiam oni admiras la *Tri Virgulinojn*.

Klod

Notoj:

1	montplataĵo		un plateau en montagne
2	senjoro		le seigneur du village
3	ŝirme de	sub la ŝirmo de	à l'abri de
4	ŝpruce		en jaillissant
5	sturmis	vigle atakis	
6	rabis	per forto kaptis	
7	dumrajde	dum la rajdo	en chevauchant

iPad-o alvenis Eŭropon, kaj ĉe mi...

Jam de pluraj jaroj, mi revenas pri aparato simila al iPad-o. Malpeza, ret-konektebla, portebla. Multaj homoj diros, ke ne estas facile uzi ĝin, kompare al «*iPhone*», sed tia aparato ne estas poŝ-komunikilo.

Mi ŝparis de pluraj monatoj por aĉeti ĝin ekde kiam eblos. Finfine la 10-an de majo, mi konsultis la retpaĝaron de **Apple** kaj mendis la tiel atenditan iPad-on. Mi ricevos ĝin la 29-a de majo.

Komprenoble mi tuj ekuzos ĝin. Feliĉe, **Apple** liveras la aparaton kun plenigita memorilo.

Mi instalas la sistemon pere de iTunes kaj mia iMac. La instalado estas rapida. Tiam, mi komprenis ke iPad-o estas dua komputilo, ĉiam oni bezonas ĉu hejm-komputilon, ĉu tek-komputilon, konektata al reto. Precipe, tio estas grava, por savi la enhavon de iPad-o.

Komence mi solvis la ret-konektajn problemojn, kaj eklernis uzi tian aparaton.

Mi tie ne pritraktos tiujn horojn da lernado. Tio estos longa kaj ne tre interesa. Tamen la fingro-gestoj ŝajnas preskaŭ naturaj, post kelkaj minutoj.

Plej grave, mi diros al vi, kion, post unu semajno, mi faras per iPad-o, kaj kial mi komprenas ke baldaŭ ĝi iĝos tre utila.

Mi povas tajpi notojn, kaj reveninte hejmen tuj kopii la notojn sur mia iMac. Poste mi povas modifi kaj enpaĝigi la tekston. Mi ĝisdatias mian agendon sur iPad kaj ekde kiam ĝi estas konektita al la reto, ĝi samenhavigas la komputilan agendon. Mi vizitis la retpaĝaron «**projet Gutenberg** (projekto Gutenbergo)», kaj senpage en-iPad-igis plurajn e-librojn (Esperant- kaj franc-lingve), tiel mi povas ĉu hejme, ĉu en la trajno legi malnovajn librojn. Mi povas legi la PDF-Formaton de la ĵurnalo «**Le Monde** (La Mondo)» kaj de «**l'Yonne républicaine** (la respublika Jon')», lokan ĵurnalon, en kiu mi skribas pri sporto. Ekzistas ankaŭ multe da senpagaj iPadaj Programaroj sur «**Appstore**». Mi povas desegni per fingro kaj sendi tion per e-mesaĝo en mian komputilon, aŭ en alian.

Mi povas ludi, ĉar pluraj ludoj ekzistas en senpaga versio.

Iom post iom, mi vizitas «**Appstore**»-n, kaj eltrovis du iPadilojn, tre utilajn.

La unua estas «**Airvideo**», kiu ebligas rigardi filmojn de sur via hejm-komputilo sur iPad-on. Tiel vi ne bezonas kopii la filmon sur iPad-on, due la formato de la filmo ne gravas,

«**Airvideo**» iPad-formatas la filmon. Tio eblas per *wifi*, hejme, sed ankaŭ eblas rete rigardi filmon de sur via hejm-komputilo. Komprenoble povas ekzisti kelkaj konektaj problemoj. Plie, anstataŭ funkciigi televidilon, vi ŝparas energion uzante iPad-on.

Ensekvanta sekcio la aŭtoro prezentas «*la instruon de la etnolingvoj*»: pli kaj pli la etnolingvoj alprenas la fremdajn proprajn nomojn kun ilia origina skribo. Nu, la kutimo de la etnolingvoj, sur kiu sin apogas A. Cherpillod, ne validas por internacia lingvo. Tion bone klarigis, jam antaŭ 50 jaroj, Avoto, kiun mi citis en la n° 57 de La Sago: *Du britoj kredeble misprononcus germanan nomon proksimume same, kaj povus aludi ĝin konversacie sen miskompreno. Tamen francomisprononcus ĝin tute alimaniere, kaj eĉ ne rekonus ĝin el la buŝoj de britoj*. Aliflanke, la aserto de A. Cherpillod estas nur parto de la vero; sufiĉas veturi en Belgio, Bretonio, Okcitanio, Eŭskio, Katalunio,



Novajo

La bildstrioj kiel lernolibroj

Michel Dechy
Villeneuve-d'Ascq, 2010

Lernolibro bazita sur bildstrioj. Kun abundo da informoj, ekzemploj kaj ekzercoj.

Ĉi tiu verko helpas vin praktiki Esperanton, kaj amuze progresigos vin. Vi precipe rendezuos kun Tinĉjo, ĉefrolulo de Hergé, kies franclingva verko estas ja famkonata...

32 paĝoj, 30 cm, 6€



ktp por konstati ke la geografiaj propraj nomoj ŝanĝiĝas kun la lingvo; la dulingvaj vojmontriloj kaj la dulingvaj paneloj ĉe la enirejoj de la urboj kaj vilaĝoj abunde pruvas tion. Oni malofte vidas familiajn nomojn skribitajn per loka dialekto, sed ili plu estas elparolataj tiel, kaj tio aspektas tute natura por la homoj vivantaj en dulingva regiono. Kiam la okcitanaj propraj nomoj ekdevis esti registritaj franclingve, en mia regiono, fine de la 16a jarcento, oni ĝenerale transkribis ilin, nek pure fonetike nek pure skribe, sed tiel ke ili aspektu franclingvaj, interalie danke al siaj finaĵoj, kaj restu rekoneblaj de la nomatoj aŭ de la loĝantoj; ekzemple Andriu, kaj ties ina formo Andriva, prononcataj (ankoraŭ nun) Ondriu kaj Ondribo, fariĝis Andriou. Same agis Zamenhof konstruante la leksikon de Esperanto, kaj same ni povas fari por la propraj nomoj.

Pri la internacie konataj geografiaj propraj nomoj, A. Cherpillod preskribas, ke ili estu esperantigitaj baze de la plej internacia formo, ne de formo nur loke konata, ekzemple *Florenco*, *Hinduĵo*, *Hispanuĵo*, *Kolonjo*, ne *Firenzo*, *Barato*, *Espanuĵo*, *Kolno*. Tio estas logika; tamen la kvalifiko «internacia» ofte signifas «konforma al la deziro de la plej potenca regno». Se la aŭtoro respektus siajn malsamopiniatojn, li povus almenaŭ kompreni, se ne aprobi, ke ekskolonioj deziras ne plu porti la nomon, kiun trudis la konkerintoj. Tiu kompreno pravigus pli nuancitan preskribon.

Malgraŭ mia malakordo kun la pledo de A. Cherpillod, mi rekomendas la legadon de *La propraj nomoj* (same kiel de *La Zamenhofa vortfarado*); lia analizo de la problemo de la propraj nomoj estas nekompleta, ĉar li preteratentas la prononcan aspekton, kiel se Esperanto estus morta lingvo; tamen lia studo estas interesa. Oni pardonu liajn malŝatajn frazojn, rigardante ilin kiel nurajn distingajn markojn de la stilo de la aŭtoro.

Andreo Andrio

Baldaŭ havebla!



Songoj de kristalo

Jérôme Leroy
Trad. LeQuint-Le Puil

Juvelo eldonita de SAT-EFK

Gvatu la anoncon en la ontaj numeroj!

Ĉe la kolegoj...

La Arĝenta Ŝlosilo

FANTASTO FANTAZIO • SCIENCA-FIKCIO

Ekde jaro 1987 nia franca senprofita asocio La Clef d'Argent (La Arĝenta Ŝlosilo) eldonas librojn, kiuj temas pri Fantasto, Fantazio, aŭ Scienca-Fikcio. Ni decidis krei novan kolekton de libroj en Esperanto. La unua eldonita romaneto estas elfrancigita fantasta rakonto de la verkisto Jonas Lenn. Ni ankaŭ planas eldoni rakontojn originale verkitaĵojn en Esperanto.

Se vi deziras havi pli da informoj pri nia eldonejo, bonvolu viziti ĉi tiujn ligilojn:

La Arĝenta Ŝlosilo: <http://www.argenta-slosilo.org>

Nia originala franclingva retejo: <http://www.clef-argent.org>

Philippe Gindre



La Karna Maŭzoleo,

Jonas Lenn.

Kovrilo: P. Gadioux.

Esperantigita el la

franca de E. kaj F.

Desbrières, kaj G.

Martin

13 x 17 cm. 52 p.; 10 €

La Arĝenta Ŝlosilo - senprofita asocia eldonejo, faka pri fantasto, fantazio, kaj scienca-fikcio - 9 rue du Stade - 39110 Aiglepierre - France

konkurso

Nova emblemo por SAT-Amikaro

Dum la kongreso ni decidis daŭrigi la akcepton de proponoj ĝis la somerfino, k la fina voĉdono okazos pere de la referendumo.

Ne finiĝis somero, kaj ni ricevis du pluajn kontribuojn, kies kolora versio aperas kovrilpaĝe.

K



L



Praktikaj informoj

Sidejo:	Lunde	18h30 - 19h30
dejoj-	Marde	10h00 - 16h00
horoj	Merkrede	14h30 - 18h00
	ĵaŭde	15h30 - 18h30
	Vendrede	09h30 - 19h30
	Sabate	11h00 - 18h00

■ Kursoj.

Por la unua grado, vidu lastan paĝon de la franclingva suplemento.

Ĉe la sidejo:

Parolaj perfektigaj kursoj dua grado: ĉiun merkredon, je la 16a, kun Phil Guichet, **ĉiun ĵaŭdon**, je la 15a, kun Élisabeth Barbay, kaj **ĉiun vendredon** je la 17a kaj duono, kun Vito Markovo. **Triagrada: ĉiun sabaton**, je la 16a kun Vincent Charlot.

La Babilrondo de SAT-Amikaro okazas **ĉiun duan merkredon** de la monato, je la 11h45 gxis 14h30 kun Thérèse Pinet.

■ **Perkorespondaj kursoj, dua kaj tria grado:** Claude Gerlat 38€. (senlaboruloj kaj ĝis 25jaraĝaj junuloj: 19 €.) Ĉeko profite al SAT-Amikaro.

Pedagogio: Mireille Grosjean, Serĝo Sir'.

Kotizoj 2010 al SAT-Amikaro, inkluzive de abono al "La SAGO": 35€

Prezo por unu ekzemplero: Francio, Belgio: 3,60 € ; Svisio: 3,80 F.S. ; aliaj landoj: 4,60 €.

Abono 2010 al la revuo, sen aliĝo al SAT-Amikaro: Francio, Belgio : 32 €; Svisio : 43FS; aliaj landoj : 39 €.

Por pagi:

■ **En Francio:** SAT-Amikaro CCP: 37 852 90 L La Source. (Ĉekoj al la kasisto: Guy Martin) IBAN, (por pagi el eksterlando): SAT-AMIKARO. FR32.2004-1010-1237-8529-0L03-314 BIC: PSST FRPPSC

■ **En Belgio:** Claude Glady: Bankkonto N° 750-6373051-18 IBAN B50 7506 3730 5118 BIC: AXABBE22

■ **En Svisio:** Mireille Grosjean: Poŝta konto n° 23-14908-9.

La SAGO: Kiu faras Kion?

Directeur de la publication: Guy Cavalier.

Ĉefredaktanto: Vito Markovo.

Enpaĝiganto: Serĝo Sir'.

Redakt- kaj korektskipo: Andreo Andrio, Ĵak LePuil, Vito Markovo, Serĝo Sir'.

Helpas al la korektado: Janine kaj Yannick Dumoulin, Veronique Girard, Phil Guichet, Lino Markovo.

KONTRIBUAĴOJ BONVENAJ! SENDU ILIN:

■ Prefere per reto, al **lasago@free.fr**, **tekstoj** en RTF aŭ TXT formo por aneksitaj dokumentoj, eventuale en la korpo mem de la mesaĝo, skribitaj per ajna sistemo de ĉapeligo (sed Unikodo preferata), bildoj en TIFF, JPEG aŭ GIF formo.

■ Eventuale sur papero, tekstoj **prefere** tajpitaj, sen forstreko nek surkorekto (erarojn eventualajn, oni indiku marĝene) al La SAGO, ĉe Serĝo Sir'. (ne tajpitaj kontribuajtoj publikeblas nur se troveblas volontula tajpanto)

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Represo de artikoloj permesata kun indiko de la fonto

Adresaro

La SAGO-abonoj: ĉe Guy Martin,

La SAGO-redaktado: ĉe Serge Sire.

Sidejo de SAT-Amikaro: 132/134 boulevard Vincent-Auriol 75013 Paris

Tel.: 01 44 24 50 48 kaj 01 44 24 50 02

TTT-ejo: www.sat-amikaro.org

Reto: sekretario@sat-amikaro.org

Claude Gerlat 11 bd Maréchal Leclerc 38000 Grenoble tel. 04 76 01 91 71

Reto: claud.gerlat@orange.fr

Claude Glady: Rue du Culot, 1; B-5630 Cerfontaine; Reto: cglady@arcadis.be

Tel: 071/64 49 16 (en Belgio).

Mireille Grosjean: Grand-rue 9, CP 9

CH-2416 Les Brenets

Guy Martin: 3 rue Voltaire

22000 Saint-Brieuc

Serge Sire (Serĝo Sir')

85 impasse des Féés 74330 Sillingy

Reto: lasago@free.fr

SAT

Abono al "Sennaciulo" 2010: 57 €

■ **En Francio:** Pierre Quillaud; 16 rue du Lt-Vaisseau-Paris 76120 Le Gd-Quevilly

p.k. SAT-Peranto 17 333 10 N Paris.

■ **En Belgio:** Jakvo Schram; Hof Ter Bekestraat 49 BE-2018 Antwerpen

p.k. 000.1692025.54 (Schram - SAT).

Kiel esperantigi proprajn nomojn

11

La fonemo **ĵ** de la franca lingvo estas skribita, jen per la litero **-j-**, jen per la litero **-g-** antaŭ la vokaloj **-e-**, **-i-** aŭ **-y-**. Tamen oni ne povas ĉiam esperantigi per **-j-** tiun fonemon de la franca lingvo. Tri aliaj literoj estas uzataj: **-j-**, **-ĝ-** kaj **-g-**.

En la vortoj de esperanto devenantaj de franclingva fonto entenanta **-j-**, oni trovas jen **-ĵ-**, jen **-j-**. Jen unue kelkaj fundamentaj vortoj kun **-j-**: **ĵaŭdo** (*jeudi*), **ĵaluza** (*jaloux*), **ĵeti** (*jeter*), **ĵongli** (*jongler*), **ĵurnalo** (*journal*); oni trovas en PIV kelkajn proprajn nomojn tiel esperantigitaj: **Anĵuo** (*Anjou*), **Bojolezo** (*Beaujolais*), **Dijono** (*Dijon*), **Ĵeromo** (*Jérôme*), **Ĵerzejo** (*Jersey*), **Ĵulo** (*Joule*), **Ĵuraso** (*Jura*). (Ankaŭ *Djibouti* ricevas fonetikan esperantigon en PIV, sub la formo **Ĝibutio**). Mi proponas tiel esperantigi preskaŭ ĉiujn franclingvajn proprajn nomojn. Jen unue la geografiaj:

Ajaccio	Aĵakcio.
Barjols / barjolais.	Barĵolo.
Fréjus / fréjusiens.	Freĵuso.
Gujan-Mestras / gujanais.	Guĵan'-Mestraso.
Jauzé / jauzéens.	Ĵaŭzeo.
Jarnac / jarnacais.	Ĵarnako.
Jarrie.	Ĵario.
Jonzac / jonzacais.	Ĵonzako.
Jonquièrre / jonquiérois.	Ĵonkjero.
Josselin / josselinais.	Ĵoseleno.
Jouarre / jotranciens.	Ĵuaro.
Joué-lès-Tours / jocondiens.	Ĵue'-ĉe-Turo.
Juan-les-Pins.	Ĵuanlepeno.
Juliéna.	Ĵuljenaso.
Jumièges / jumiégeois.	Ĵumjeĝo.
Jurançon / jurançonais.	Ĵuransono.
Juvisy / juvisiens.	Ĵuvizio.
Marvéjols / marvéjolais.	Marveĵolo.
Meije (<i>mej</i>).	Meĵo.
Méjean.	Meĵano.
Mijoux / mijolands.	Miĵuzo.
Montmajour.	Monmaĵuro.
Port-Jérôme.	Porĵeromo.
Saint-Jacques.	San-Ĵako.
Saint-Jacut-de-la-Mer / jaquens.	San-Ĵakut'-de-l'-Maro.
Saint-Jouin-de-Marnes.	San-Ĵuen'-de-Marno.
Saint-Julien.	San-Ĵulieno.
Saint-Junien / juniauds.	San-Ĵunieno.
Saint-Trojan-les-Bains.	San-Trojan'-Banurbo.
Saujon / saujonais.	Sauĵono.

Ĉi-sube estas kelkaj ekzemploj de familiaj nomoj esperantigitaj same:

Barjavel.	Barĵavelo.
Béjart.	Beĵaro.
Cajun.	Kajuno.
Cujas.	Kuĵaso.
Danjon.	Danĵono.
Goujon.	Guĵono.
Grosjean.	Groĵano.
Jacob.	Ĵakobo.
Jacquard.	Ĵakaro.

Jarry. Ĵario.
Jaurès. Ĵaŭreso.
Joffre. Ĵofro.
Jouas. Ĵuaso.
Jospin. Ĵospeno.
Jourdain. Ĵurdano.
Jourdan. Ĵurdano.
Lejeune. Leĵuno.
Majorelle. Majorelo.
Pajou. Paĵuo.
Saint-Just. San-Ĵusto.

Aliaj esperantaj vortoj, kiuj ŝajnas deveni de franca fonto, konservas sensupersignan **-j-**. Jen unue kelkaj tiaj fundamentaj vortoj: **adjektivo** (*adjectif*), **Januaro** (*janvier*), **jasmeno** (*jasmin*), **Jozefo** (*Joseph*), **jugo** (*joug*), **juĝi** (*juger*), **Julio** (*juillet*), **Junio** (*juin*), **jupo** (*jupe*), **justa** (*juste*). Troveblas en PIV propraj nomoj esperantigitaj same: **Ajakso** (*Ajax*), **Jakelino** (*Jaqueline*), **Jamajko** (*Jamaïque*), **Jenero** (*Jenner*), **Jeremio** (*Jérémie*), **Jesuo** (*Jésus*), **Joakimo** (*Joachim*), **Jordano** (*Jourdain*), **Josuo** (*Josué*), **Judas** (*Judas*), **Juliano** (*Julien*), **Jupitero** (*Jupiter*), **Justeno** (*Justin*). La ĉi-supraj vortoj devenas de latina aŭ alia fonto, kaj tiu maniero ne povas ĝenerale konveni por esperantigi franclingvaj nomojn, pro malbona parola rekonebleco.

Ni konsideru nun la franclingvaj vortojn, kies fonemo **-j-** estas skribita per **-ge-** aŭ per **-gi-**. En la fundamentaj vortoj, tiu fonemo estas transkribita per **-g-** aŭ per **-ĝ-**, kio indikas, ke Zamenhof tre atentis la skriban rekoneblecon; cetera nia lingvo ankoraŭ estas pli uzata skribe ol parole. Jen kelkaj fundamentaj vortoj kun **-ĝ-**: **aĝo** (*âge*), **anĝelo** (*ange*), **aranĝi** (*arranger*), **arĝento** (*argent*), **burĝo** (*bourgeois*), **danĝero** (*danger*), **forĝi** (*forger*), **franĝo** (*frange*), **fromaĝo** (*fromage*), **gorĝo** (*gorge*), **ĝemi** (*gémir*), **ĝeni** (*gêner*), **ĝermo** (*germe*), **juĝi** (*juger*), **kaĝo** (*cage*), **pejzaĝo** (*paysage*), **ruĝa** (*rouge*). En PIV oni povas trovi proprajn nomojn esperantigitajn same: **Adiĝo** (*Adige*), **Alĝero** (*Alger*), **Anĝero** (*Angers*) (sub Anĵuo), **Betelĝuzo** (*Bételgeuse*), **Ĝermano** (*Germain*), **Ĝirondo** (*Gironde*), **Ĝofredo** (*Geoffroy*), **Lagranĝo** (*Lagrange*), **Lieĝo** (*Liège*), **Limoĝo** (*Limoges*), **Niĝero** (*Niger*), **Oranĝo** (*Orange*), **Roĝero** (*Roger*). Mi proponas esperantigi multajn proprajn nomojn tiel; jen unue la geografiaj:

Agen. Aĝeno.
Ariège. Arjeĝo (rivero).
Audenge / audengeois. Aŭdenĝo.
Baugé / baugeois. Baŭĝeo.
Bergerac / bergeracois. Berĝerako.
Bouyval / bouyvalais. Buĝivalo.
Le Bourget. Burĝeto.
Brouage. Bruaĝo.
Carouge / carougeois. Karuĝo.
Donges / dongeois. Donĝo.

Les Éparges. Eparĝo.
Figeac / figeacois. Fiĝako.
Forges-les-Eaux / forgions. Forĝo-Banurbo.
Fougères / fougerais. Fuĝero.
Fruges / frugeois. Fruĝo.
Ganges / gangeois. Ganĝo.
Garges-lès-Gonesse / gargeois. Garĝo-ĉe-Goneso.
Gérardmer / géromois. Ĝerarmero.
Gex / gexois. Ĝekso.
Gévaudan / gabalinois. Ĝevodano.
Gien / giennois. Ĝieno.
Giens. Ĝienso.
Gif-sur-Yvette / giffois. Ĝifo-ĉe-lveto.
Givet / givetois. Ĝiveto.
Gisors / gisorsiens. Ĝizorso.
Givors / givordins. Ĝivordo.
Hagetmau (-ĵet-). Haĝetmaŭo.
Hagondange / hagondangeois. Hagondanĝo.
Hayange / hayangeois. Hajanĝo.
Langeac / langeadois. Langako.
Largentière / largentiérois. Larĝentjero.
Margeride. Marĝerido.
Megève. Meĝevo.
La Mongie. Monĝio.
Montgeron / montgeronnais. Monĝerono.
Montrouge. Monruĝo.
Mougins. Muĝeno.
Riorges. Riorĝo.
Saint-Fulgent. San-Fulĝeno.
Saint-Geniez-d'Olt (-nĵedolt). San-Ĝenjedolto.
Saint-Genis-Laval. San-Ĝeni'-Laval.
Saint-Gildas. San-Ĝildaso.
Saint-Gilles / saint-gillois. San-Ĝilo.
Saint-Girons / saint-gironnais. San-Ĝirono.
Saint-Jean-d'Angély / augériens. S a n - Ĵ a n ' - d e - Anĝelio.
Saint-Rambert-en-Bugey. San-Ramber'-en-Buĝejo.
Sassenage / sassenageois. Sasnaĝo.
Sigeac / sigeanais. Siĝano.
Taninges. Taniĝo.
Toulonges. Tulonĝo.
Ugine / uĝinois. Uĝino.
Uriage. Uriĝo.
Vergèze. Verĝezo.
Vougeot. Vuĝoto.

Ĉi-sube kelkaj familiaj nomoj, esperantigitaj same:

Augier. Aŭĝjero.
Bélangier. Belanĝero.
Bigéard. Biĝaro.
Delage. Delaĝo.
Demangeon. Demanĝono.
Gélinier. Ĝelinjero.
Genet. Ĝeneto.
Gide. Ĝido.
Giono. Ĝiono.
Giscard. Ĝiskardo.
Hamburger. Hamburĝero.
Hergé. Herĝeo.
Langevin. Langeveno.
Legendre. Leĝendro.

Magendie. Maĝendio.
Messagier. Mesaĝjero.
Nungesser. Nunĝesero.
Pinget. Pinĝeto.
Plantagenêt. Plantaĝeneto.
Rogier. Roĝjero.
Rougemont. Ruĝmonto.
Rouget de Lisle. Ruĝet' de Lilo.
Soulages. Sulaĝo.
Suger. Suĝero.

Nikonsideru nun la fundamentajn vortojn, en kiuj **-g-** respondas al **-g-** sekvata de **-e-** aŭ **-i-** de la franclingva vorto: **agi** (*agir*), **argilo** (*argile*), **degeli** (*dégeler*), **degeneri** (*dégénérer*), **digesti** (*digérer*), **gelateno** (*gélatine*), **generalo** (*général*), **generacio** (*génération*), **geografio** (*géographie*), **genuo** (*genou*), **Georgo** (*Georges*), **gesto** (*geste*). Ankaŭ kelkaj propraj nomoj estas tiel esperantigitaj en PIV: **Angeliko** (*Angélique*), **Brigito** (*Brigitte*), **Gerardo** (*Gérard*), **Gervazo** (*Gervais*), **Gilberto** (*Gilbert*), **Panurgo** (*Panurge*), **Vergilio** (*Virgile*). La grupo **-gy-** de la franclingvaj vortoj estas ĉiam transkribita en la esperanta vorto per **-gi-**: **gimnastiko** (*gymnastique*), **ginekologo** (*gynécologue*), **gipso** (*gypse*).

Mi ne proponas multajn esperantigojn tiajn, ĉar suferus la parola rekonebleco. En esceptaj okazoj tio povas utili, ekzemple por eviti homonimecojn aŭ kiam la vorto entenas elementon jam kutime tiel esperantigita, ekzemple:

Nuits-Saint-Georges. **Nuito-San-Georgo.**

Inverse, por eviti homonimecojn, povas esti oportune esperantigi la francan **-ge-** laŭ la fonetiko, t. e. per **-ĵ-**. Oni trovas tiajn komunajn nomojn en PIV: **jeleo** (*gelée*), **ruĵo** (*rouge à lèvres*). Jen ekzemplo por geografia nomo:

Bourges / berruyers **Burĵo**

En lasta kategorio troviĝas nomoj, kies esperantigo povas deveni de etimologia fonto, kiel **Vogejoj** (*Vosges*), trovebla en PIV. Oni povas uzi tiun metodon por *Saintonge*: ĝi estas la regiono de la gaŭla gento nomata *Santones*, kies ĉefurbo estis *Mediolanum Santonum*, nun nomata *Saintes*. Mi proponas la jenajn esperantigojn:

Saintes / saintais. **Santono.**

Saintonge. **Santonio.**

Konklude, la ĝenerala regulo por esperantigi nomojn kun la litero **-j-** estas transkribi ĝin per **-ĵ-**, kiel **Dijono**; por nomoj kun **-ge-** aŭ **-gi-**, transkribi tion per **-ĝe-** kaj **-ĝi-**, kiel **Anĝero** kaj **Ĝirondo**. Tiel estos ĝenerale konservita maksimuma rekonebleco, skriba kaj parola. Nur en esceptaj okazoj alia esperantigo estas rekomendinda.

Andreo Andrio

De Beziero (34) al Mongolio

De la 6a ĝis la 29a de Junio 2010, Line, Martine, Genevieve A. kaj Genevieve G. veturis per trajno, aviadilo, buso kaj aŭto de nia regiono ĝis la Gobia dezerto.

Ni aliĝis al la karavano en Moskvo, kie ni retrovis Evelyne kaj Nicolas. Ili ĵus alvenis de Sankt-Peterburgo kun kelkaj samideanoj. La karavano konsistis el 27 personoj. La plej multo venis el Francio. Ni rimarkis unu usonanon, du nederlandanojn, unu italon, du portugalojn kaj Marcel Delforge-n el Belgio.

Dum tri tagoj ni vizitis Moskvon, ĉefe Kremlinon, multajn preĝejojn kaj monaĥejojn. Pluraj ĉiĉeronoj gvidis nin. Du komencantaj esperantistoj promenigis nin laŭlonge de la malnovaj stratoj de la ĉefurbo.

Poste la transiberia aventuro komenciĝis. Kelkaj el ni dormis en kvarpersona kupeo, aliaj elektis «plakarton» (popolan vagonon), kie ili renkontis rusojn kaj babilis kun ili. Iom post iom ni alkutimiĝis al la trajna vivo por kelkaj tagoj. La trajno trairis vastegajn betulajn arbarojn, vilaĝojn kaj urbetojn. Kiam la trajno haltis, ni malsupreniris kaj enirante por aĉeti kukojn aŭ fruktojn.

Iom post iom ni konatiĝis unu kun la alia, multe babilis en la kupeo, en la koridoro aŭ en la restoracio. Kiam ni deziris ni trinkis teon aŭ kafon dank' al samovaro, kiu staris komence de la vagono. La stevardinoj estis afablaj kaj helpemaj. Ili multe laboris, por ke la vagono restu pura.

En Krasnojarsko atendis sur la kajo multaj akceptemaj esperantistoj. Kune ni vizitis la urbon. Ĉiam unu el la klubo klarigis al ni la diversajn lokojn. Ni rimarkis belajn placojn,

ĝardenojn kaj de la ponteto ni vidis Jenisejon, kiu fine de printempo inundas la bordojn de la rivero pro degelo de la neĝo. Ni partoprenis en la distra vespero per poemo de Fernande Terral, per du kantoj (*la bela vito* kaj *se kanto*). Poste ni aŭskultis fablon de Lafonteno, KDon de Kajto, kantojn de Rusio kaj akordionon antaŭ liberaj dancoj. Kia bela vespero!

En Irkutsko ni denove eltrajniĝis por viziti la urbon kaj ĝian riverbordon. Poste ni veturis sur tera vojo al la Lago Bajkalo, precize sur la plej vasta insulo. De tie ni enŝipiĝis por promeni sur la kvietaj puraj akvoj de la lago ĝis la insuleto de la stupao (budhista monumento).

Ni dormis en kampara hotelo dum du noktoj.

Post la landlimo ni malkovris Mongolion.

Sant-Enimio (48)

Malmultaj ni estas en Lozerio, tamen ni provas «antaŭenigi la ŝmilblikon»^o. :-)

Krom nia partopreno en la «literaturaj renkontoj en Le Pompidou» («Rencontres littéraires du Pompidou»), la 11an de julio, ni vigligis esperantan semajnon en la pitoreska vilaĝo Sant-Eminio (Sainte-Éminie), kore de la riverkanjono Tarno (Gorges du Tarn). Kvankam tio okazis en plenplena turista sezono, la vizitantoj ne interpuŝiĝis. Tamen eblis diskuti kun junuloj kaj familioj kiuj malkovris tie la internacian lingvon. Dum la lasta semajno de julio, *François Gaudry*, urbestro k departementa konsiliano de Sant-Emiliano amike disponigis al ni por ekspozicio la ĉambron de urba konsilio. Dumtempe, la

urbodomo afiŝis la esperantajn kolorojn.

Nun, alia ago en «*Le Pompidou*». La komunumo gastigos dum 2 semajnoj gejunulojn el diversaj landoj (Japanio, Kongo, Germanio, Ukrainio, Rusio, Turkio, Belgio, kaj Koreio). Ili laboros en ia konstruejo por junaj volontuloj. Komprenoble, mi kaptos la okazon por renkontiĝi kun ili kaj disdoni kelkajn informojn pri la internacia lingvo. Kaj poste, ĉiu el ili ricevos prezentaĵon pri esperanto en sia gepatra lingvo! Dank' al la retlisto «*Esperanto-en-lernejojn*» mi rapide ricevis ĉion kion mi deziris por fari tiajn broŝurojn!

Ni ankoraŭ partoprenos al la «festo de la *Ayres*» (21an-22an de aŭgusto)-festo de la PCF (Franca Kompartio) de Lozerio-

per stando de Esperanto-Info kaj SAT-Amikaro.

Krome, mi partoprenis al unusemajna staĝo en Kastelo Greziljono, kie mi renkontis interesegajn samideanojn. Mi laŭde konsilas tiujn staĝojn al ĉiu kiu volas bonigi sian praktikon. La esperanta kulturdomo bezonas ankaŭ subtenon kaj venon de ĉiuj kiuj volas kreskigi tiajn lokojn kie vivadas niaj ideoj, ĉu ne?

Komprenoble, ĉi tiu somera bilanceto estas nur komenco: ni estas nur triopo en Lozère kaj jam ni pripensas aliajn projektojn por la aŭtuno...

A. Runel

^o *familiara francismo por «progresigi la aferon»*

San-Stefano (42)

La urbo San-Stefano

Bela urbo, 60 km for de Liono. De pluraj jaroj, la urba loĝantaro suferas pro la sinsekvaj ekonomiaj «restrukturigadoj». En la jaroj 1970aj fermiĝis la karbo-minejoj, en la 80aj kaj 90aj jaroj ni observis ankaŭ la fermon de gravaj entreprenoj: kiel Ŝtal-fabriko «Aciéries du Marais», Ĉokolad-fabrikoj, multaj et-entreprenoj pri teksado, pri biciklo-eroj, kaj la fam-konata «Manufrance». Poste, sekvis en la lastaj jaroj la fermiĝo de GIAT (armil-fabrikado) kaj de kelkaj monatoj plu malaperas laborpostenoj industriaj... La urbo perdis pli ol 20 000 loĝantoj en 20 jaroj!

Ne mankas universitatoj, aŭ alt-lernejoj (Inĝenieroj, flegistoj, komercistoj, ktp. Eĉ troviĝas Instituto pri Altaj Studoj en Socia Asekuro) tamen, pro manko de perspektivoj, plej ofte la studentoj forlasas la urbon je la fino de siaj studoj. Same, kelkaj membroj de la klubo devas labori ekster la urbo.

La Esperanto klubo de San-Stefano:

Nia lingvo internacia estas praktikata de pli ol unu jarcento en nia urbo.

Pluraj esperanto-asocioj ekzistis en nia urbo, kaj nia klubo plutenas arĥivon, kiu montras esperantistojn en la jaro 1904! Ankaŭ ĉe ni okazis en 1922 nacia kongreso de la «*Travailleurs Espérantistes*» ((la praŭloj de Sat-Amikaro). Sur la kongresfoto, amuze videblas, ke ĉiuj virinoj portas la samajn ĉapelojn, sonoril-formajn! Ne de hieraŭ datiĝas la vesto-modo kaj ties socia premo!

Klopodoj por la videbleco de Esperanto:

Ĝenerale, la loka tag-jurnalo «*La Tribune*» volonte konsentis aperigi artikolojn. Nun, ĝi estas filio de la regiona gazet-grupo «*Le Progrès*» kaj la afero iom malfacilas...

En la jaro 1999, ni organizis regionan kongreson kiu arigis preskaŭ 100

partoprenantojn el *Clermont-Ferrand*, *Haute-loire*, *Lyon*, *Chambéry*, *Valence*, *Romans* kaj aliaj lokoj. Grupo de Lionaj junuloj ludis teatraĵon en Esperanto, tradukitan de *Oscar Wilde*! Tamen, ni trovis, ke la respegulado far la amas-informrimedoj estis vere nesufiĉa. (Radio-stacioj, televida regiona kanalo, ktp)

En 2004, por festi la centjariĝon de la lingvo en San-Stefano, ni preparis tabulojn por ekspozicii en la galerio de FNAC. Sed, malgraŭ ilia antaŭa konsento, la respondeculoj subite nuligis la aferon (sen klarigo) kaj ni povis tamen ekspozicii en la Urba Turismo Agentejo, bedaŭrinde malpli vizitata! Spite al niaj afablaj petoj, neniu ĵurnalo aŭ informilo pensis utila respeguli tiun fakton: 100 jaroj da lingva praktiko, sen ia ajn oficiala apogo!

La regiona kongreso de 2010.

Ĉi-jare, fine kelkaj el ni troviĝis pli liberaj kaj ni akceptis organizi la jaran Regionan Kongreson de la Federacio Rodan-alpa. Tiu kongreso okazis je la 29a kaj 30a de majo

Ĉe la stacidomo de Ulanbatoro, atendis la prezidanto de la Mongolia Esperanta Asocio kun aliaj samideanoj, kiuj helpis nin por trovi niajn dormlokojn.

La 6a Azia Kongreso en la plej nova hotelo Ĝingis Ĥano malfermiĝis kun 254 partoprenantoj el 16 aziaj landoj kaj 14 el aliaj lokoj. La Japanoj estis la plej nombraj kaj multaj el ili helpis la Mongolan Asocion por la sukceso de la kongreso. La fakkunsidoj estis diversaj. Ni sekvis la lecionon pri la mongola lingvo kaj malkovris ĝian malnovan skribmanieron.

Dum la distraj vesperoj ni malkovris la kulturan riĉecon de la lando: dancoj, kantoj, sportoj, ktp.

La ĉefurbo rapide kreskas; la aŭtoj estas pli kaj pli nombraj. La stratoj estas movoplenaj. Ni devis esti tre atentemaj, kiam ni trairis la straton en nur 20 sekundoj. La stiristoj hupas kaj la aŭtoj daŭrigas sian vojon.

Sur la trotuaro en pluraj budoj ni povis aĉeti fruktojn, legomojn aŭ bombonojn.

Facile ni elektis popolajn restoraciojn, en kiuj ni manĝis ŝafan supon kun legomoj kaj trinkis teon kun sala lakto.

Post la kongreso, per agentejo, ni vizitis Gobian regionon. En 4/4 rusa aŭto kun sperta stiristo sur tervojoj ni kvar malkovris la dezertan parton kaj la duondezertan parton de Gobio. La francparolanta ĉiĉerono klarigis la diversecon de la pejzaĝo: dunoj, oazoj, herbejoj, stepoj, ruĝaj kaj rozkoloraj montoj. La 5 muzeloj (kameloj, ĉevaloj, bovinoj, ŝafoj kaj kaprinoj) trankvile paŝtiĝas kune. Ni vidis sanktan monton, malnovajn monaĥejojn. Apud la sala lago la brutaro trinkis kaj la rajdanta paŝtisto kondukis ĝin sur alian herbejon.

Ni dormis en jurtoj en turistaj kampadejoj. La vetero varmis, varmegis la tutan restadon kaj ni trinkis multe da akvo kaj



kokakolaon.

Kvankam la vojaĝo estis iomete laciga ni multe ŝatis tiu mitan kaj mirindan landon. Ekde nia alveno en Bezieron ni rememoras en nia kapo kaj per fotoj nian superban vojaĝon.

Cercle Biterrois d'Espéranto



SAT-Amikaro staĝo

Komputiko en Eo

**Dimanĉon,
la 26an de septembro
en la sidejo**

En tiu staĝo, vi instalos Ubuntu 10.04, eventuale en vian komputilon.

(Instalo - Esperantigo - konfiguro - akordigo - aldono de programoj...).

Ni ankaŭ enkondukos la

konceptojn de: liberaj programoj, GNU/Linux...

Lerni/uzi fakajn terminojn estos parto de la staĝo

Interesatoj

-skribu al:

libroservo@sat-amikaro.org

aŭ al: SAT-amikaro Esperanto

Komputiko en Eo

132-134 Bd. Vincent-Auriol

75013 Paris

- aŭ telefone alvoku vendrede:

01 44 24 50 48

Zorgas pri, kaj komunikis: Phil'



2010 en la lokalo de *l'Amicale Laïque de Tardy*, kiu disponas pri teatro kun 400 seĝoj kaj modernaj son- kaj lum-rimedoj. Ni sukcesis starigi riĉan programon, kun tri prelegoj⁽¹⁾, lingvo-atelieroj, aŭkcio favore al la afrika klubo de Goma en RDC (eks-Zairio), vizito de la Karbomineja Muzeo, inicado al la loka ludo «Cerbatano» [Sarbacane] kaj vespera koncerto de Jomo, nun bone konata kantisto en nia medio esperantista.

Ni provis ĉi-foje allogi la eksteran publikon, profitante la okazon de la kongreso. Ni plenumis multajn kontaktojn kun la gazetoj: La Tribune, La Gazette, kun dekduo da radio-stacioj, kun televidokanalaj: France 3 kaj TélÉ7, kun la lokaj sindikatoj de la Laborborso, kun diversaj asocioj, ktp. Por tio, ni eldonis afiŝeton kaj flug-folion, invitante veni al la prelego senpaga sabaton post-tagmeze. Krome, 60 indikiloj estis fiksitaj sur strat-fostoj por montri la vojon al la kongresejo, kio ankaŭ utilis al la videbleco de Esperanto. Kaj plie, leteron oni sendis

al la kvartalaj lernejoj por proponi al ili inicadon per ludoj al Esperanto

Granda kaj longa laboro por organizi kongreson, eĉ regionan; forirante, la kongresintoj montris sian kontenton, kun la sento, ke ili ne perdis sian tempon. La organizantoj ĝojis pro la bona disvolviĝo sed iom bedaŭris ke iliaj klopodoj malfermi la kongreson kiel eble plej larĝe al la publiko ne ricevis pli grandan sukceson.

**Pierre Grollemund
Club Espéranto de Saint-Etienne
5 rue des Teinturiers
42100 Saint-Étienne
esperantoste@yahoo.fr**

(1) André Cherpillod (franclingve, pri utileco de Esperanto), Edmundo Ludwig (esperante, pri instruado de Esperanto) kaj André-Jacques Hollbecq (franclingve, pri mon-kreado, bankoj kaj publika ŝuldo).



Esperantistoj aktivas

Kvinpetalo, Bureso (86)

Vizito de la muzikgrupo Kajto

Vendredon vespere, la 13an de aŭgusto 2010, dum la muzikstaĝo, alvenis en la Esperanto-centro Kvinpetalo la duopo Kajto, muzikgrupo tre fama en Esperantio. Ambaŭ muzikistoj kaj kantistoj, Ankie kaj Nanne, ludis ĉirkaŭ 15 muzikpecojn dum la vespero, interalie «Lokomotivo rulu nun» kaj «La lasta kanto». Ili eĉ petis de la publiko kune kanti, kaj preskaŭ ĉiuj gaje partoprenis! La vilaĝanoj kiuj ĉeestis ŝajne ŝatis la koncerton, ĉar ili petis postlastan kanzonon. Ankie kaj Nanne tranoktis en Kvinpetalo, kaj sabaton frumatene, la staĝantoj kaj ili retroviĝis en la salono «Waringhien» por iom paroli pri ilia kariero kaj ilia emo al kanto kaj muziko. Estis tre interesa momento, kun ĉies partopreno. Tiamaniere ni pli bone konatiĝis kun ili, kaj eĉ kantis kune «La malnova balancilo», kanton kiun ni denove interpretis okaze de nia staĝkoncerto dimanĉon vespere. Ankie estis kortuŝita kiam ŝi rakontis sian konatiĝon kun Nanne kaj tiam ambaŭ interŝanĝis rigardon ege komplikan...

Post la kurso, ni ĉiuj retroviĝis en la garbejo apud la manĝoĉambro por ĝui aperitivan kun kelkaj najbaroj; ni manĝetis kaj trinkis, babilante kaj aŭskultante denove Kajton ludi diversajn muzikpecojn. Kelkaj el ni eĉ aŭdacis danci, la etoso estis tre agrabla!

Sendube ĉiuj havos bonegan memoradon pri tiuj du tagoj...

Do, vidu: Okazas multaj aferoj en la eta vilaĝo Bureso!

Meva Cuenot.

Menciindas, ke SYM (Société Yvonne Martinot), administranta asocio de la esperanto-centro Kvinpetalo, venigis Kajton por festi la 25-jariĝon de la asocio, k tiuokaze ankaŭ estis pretigita ĉ. 30-panela ekspozicio memorigante bildo pri la disvolviĝa historio de la centro.

Muzikstaĝo

Kiel kutime ni kuniĝis de la 8a ĝis la 18a de Aŭgusto 2010 en Kvinpetalo. En familia kaj ĝoja etoso, ni multe laboris eĉ se ni ne estis tro nombraj. La celo esti paroli Esperante kaj kanti aŭ ludi muzikon per instrumentoj.

Ĉiumatene la temoj de la prelegoj estas interesaj pro la diverseco: la regeo de Jamaiko, la venezuela popola muziko laŭ la poemoj de Ali Primera. Vinko donis al ni novaĵojn pri amfiosko kaj ĝiaj «kuzoj», kiuj vivas en la fundo de la maro.

Ni parolis pri Kanto Ĝenerala de Pablo Neruda kaj Mikis Theodorakis. Sekve Lino kaj Morine interpretis parton de ĝi dum la koncerto fine de la staĝo.

Ĉiujn posttagmezojn la partoprenantoj multe studis diversajn verkojn, kiujn la spektantoj aŭskultis dum publikaj koncertoj. Unue, ili kantis antaŭ la spektaklo de Kajto. Nanne kaj Ankie el Nederlando prezentis Esperantajn proprajn kreaĵojn kun multe da energio kaj plezuro.

Dimanĉon vespere antaŭ la buresa publiko, la staĝantoj montris la rezulton de sia laboro. La spektantoj multe aplaudis. La 14 rusaj esperantistoj, kiuj vojaĝis tra Eŭropa Unio per buso, haltis en la Centro Kvinpetalo. Tie ili aŭskultis la lastan koncerton de la partoprenantoj. Poste ili vespermanĝis kaj multe ŝatis regionan pladon kun fazeoloj kaj kolbasetoj. Eĉ Siberiano petis la recepton de la saŭco, ĉar li opiniis ĝin pli bona ol lia.

Kun la najbaroj kaj la urbestro de Bureso, ni festis la 25an jaron de SYM (Societo Yvonne Martinot), kiu fondis la Centron «Kvinpetalo». La staĝo sukcesis, la partoprenantoj estis kontentaj; do ni rendezvas la venontan jaron en Aŭgusto 2011 kiam ni esperas esti ankoraŭ pli nombraj.

Line, Geneviève, Lino

Rusiaj Esperantistoj vizitas Kvinpetalon

Lunde vespere, 16an de Aŭgusto 2010, vizitis nin esperantistaj amikoj venintaj de Rusio per buso. Ili vojaĝis tra Eŭropa Unio kaj haltis en la Esperanta Kultura Centro Kvinpetalo, okaze de la muzika staĝo. Ili malkovris la bibliotekon kaj ĉiujn domojn de la Centro.

Ili estis invititaj aŭskulti koncerton de la staĝantoj, kiun ili multe aplaudis kaj ŝajne ŝatis. Tuj poste ni ĉiuj iris en la manĝejon por vespermanĝi kune. Bela regiona plado farita de Lin' kaj Ĝenovevo (la kuiristinoj) atendis nin kaj la Rusianoj multe ŝatis tiun vespermanĝon. Ni bone interparolis kaj ridis dum la manĝo.

Poste, kelkaj Rusianoj aĉetis T-ĉemizojn pri Esperanto. Ŝajnas ke ili bone ŝatis ĉiujn momentojn kaj foriris al Puatiero tranoktadi. Ili plu vojaĝos kaj iros al Karkasuno, Barcelono, Triesto, kie ili partoprenos Italan kongreson de Esperanto... diris la vojaĝantoj.

Teo Levi

